# KOMITATO-KUNSIDO

4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris - Métro Bastille

# dimanĉon la 24an de januaro 2021

## 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Dimanĉon la 24an de januaro 2021, de la 9a ĝis la 15a45, kunsidis en Parizo kaj rete la Komitato de Espéranto-France: [ĉeestas: S = fizike en la **s**idejo, R = **r**ete pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Alex | ANDRÉ | AA | Repr. de la membraro | R | | | |
| Véronique | BICHON | VB | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bernard | CORNEVIN | BC | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | R | | | |
| Vincent | JACQUES | VJ | Repr. de la membraro | | X | | |
| Jesper | JACOBSEN | JJ | Repr. de la membraro | R | | | |
| Maurice | JUY | MJ | Repr. de la membraro | R | | | |
| Alex | KADAR | AK | Repr. de la membraro | R | | | |
| Michael | LEIBMAN | ML | Repr. de la membraro | | | X | |
| Jean-Lucien | MAZEAU | JLM | Repr. de la membraro | R | | | |
| Claude | NOURMONT | CN | Repr. de la membraro | R | | | |
| Emmanuelle | RICHARD | ER | Repr. de la membraro | R | | | |
| Armand | SALEK | AS | Repr. de la membraro | R | | | |
| Eric | STREICHEMBERGER | ES | Repr. de la membraro | | | | ER |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de la membraro | S/R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| Bertrand | SAJUS | BS | Repr. de FKEA | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE | R | | | |
| Lucas | TEYSSIER | LT | Repr. de JEFO | | | X | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | | |
| Laurent | PEUCH | LP | Repr. de fed. Bretagne | | | | XG |
| Gilbert | STAMMBACH | AG | Repr. de fed. France-Est | | | X | |
| Marc | GIRAUD | MG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | R | | | |
| Florian | CEZARD | FC | Repr. de fed. Languedoc-Rouss. | | | | AA |
| Clair | MAHÉ | CM | Repr. de fed. Limousin | | | | |
| Michel | DECHY | MD | Repr. de fed. Nord | R | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Pascal | VILAIN | PV | Repr. de fed. Provence | R | | | |

15 retaj partoprenantoj kaj 2 komitatanoj en la sidejo
3 neĉeestantoj donis siajn povojn
→ entute 20 voĉoj, do la kunsido validas pro la atingita kvorumo (duono de la komitato).

### 0.2. Elekto de prezidanto kaj protokolanto — 5 min

Prezidas: BF
Protokolas : ER kun AA,
Provlegas : estraro

### 0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj — 5 min

### 0.4 Decido pri la protokolo de la komitatkunsido de la 13a de sep. 2020 — 5 min

DJ: Mi petas ke la protokoloj povu esti libere legeblaj ĉe la retejo Esperanto-France.org, kiel decidite en la komitat-kunveno de januaro 2019.
La estraro pritraktos la aferon por vidi, kie ni povos enretigi la protokolojn, por ke ili estu videblaj de la membroj.

### 0.5 Dato de la venonta komitato-kunsido — 5 min

Komitat-kunsidoj la 14an la 15an de majo 2021, en Trélissac, dum la nacia kongreso
Membrokunveno okazos matene la 15an de majo en Trélissac

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

### 1.1 Konfirmo de reprezentanto de Espéranto-France ĉe Greziljono — INFORMO — BF

BF: En 2020-12/2021-01 Greziljono petis nepran reprezentanton. BF petis DL, ke li restu reprezentanto.
Neniu kontraŭas.

### 1.2 Financaj aferoj kaj membro-statistiko — INFORMO — 10 min JLM / AS

https://docs.google.com/presentation/d/1uMGSaGIPfBBEWoW-THB9MWotAZq9qARH3ByVLCq70RY/

JLM: Ni havas nun ~ 500 membrojn. Falo de 130 homoj ene de 10 jaroj. Tamen proporcie estas jaron post jaro kvazaŭ la sama procento ene de ĉiu federacio. Ene de la 500 membroj estas iom malpli da homoj, kiuj ankaŭ membras en UEA, komparative al dek jaroj antaŭe. La tri plej enspezaj libroj de nia libroservo dum la 100 pasintaj tagoj estas *La Eta Princo*, la *Metodo 11* kaj *La Templo de l' Suno*. Rilate al la bilanco estas kvazaŭ ekvilibro se rigardante ĉiuj jaroj, tamen por kelkaj jaroj la bilancoj estas pozitivaj kaj aliaj negativaj; tiu situacio klariĝas per donacoj, kaj tio ŝajne ne estas tre sana, kvankam ni povas trankviliĝi ĉar ni havas monon – ĉ. 215 000 EUR. Mi proponas ke ni pripensu kategoriojn ene de budĝeta planado, ene de financa komisiono. Espereble en 2021-05 ni povos proponi ion.
BF: ni ja diskutu pri tiu temo dum la venonta komitato-kunsido.

Por 2019, statistikoj pri la jaraĝo: la averaĝa aĝo de la membroj estas ĉ. 66 jaroj; kaj estas nur 66 membroj, kiuj estas malpli ol 40-jaraĝaj.

### 1.3 Novaj diskutlistoj (por anstataŭi la Yahoo-grupon) — INFORMO — 10 min — XG

XG: La transiro de la Yahoo-serviloj al nia Sympa-sistemo ŝaltita ĉe la servilo de Espéranto-France plu daŭras. Mankas nur kelkaj retlistoj sed ĉio ŝajne ĝis nun bone funkcias. Interalie ufe-debatoj kaj kelkaj regionaj listoj.
BF havas plenan liston de homoj, kiuj estis en la listoj se mankas ĝisdataj ĝustaj retadresoj de kelkaj.
Estus bone havi informon en nia retejo pri tiu listo → ni ĝisdatigu la artikolon en nia retejo.
AA: Listo de ĉiuj listoj aperas en https://esperanto-france.org/sympa/lists do nur necesas prezenti la novan sistemon.

DJ: Ĉe sympa la arkivoj de pluraj listoj ne alireblas
XG: Tiu parto estos traktita de SM.
Ni devas ĝisdatigi la paĝon https://esperanto-france.org/retaj-grupoj
CN: demando pri la regionaj listoj → XG: kvazaŭ ĉiuj jam ekzistas. Kontrolende

### 1.4 Jara intervjuo kun Susanna — INFORMO — 5 min — BF

BF: jara intervjuo kun Susanna. Ŝi ne intencas tuj emeritiĝi sed studos tion por scii, kion ŝi rajtas fari. Ili diskutis interalie pri la stato de la sidejo. Ŝi substrekas la neceson de komuniko inter la membroj kaj la volontuloj en la sidejo. Ŝi aldonas ankaŭ, ke la ĉeesto de la volontuloj ne povas esti regulaj kiel dungitaj homoj, pro ferioj, malsano, ktp. Estus bone fari denove alvokon por trovi bonvolemulojn.

## 2. KONSCIIGO projektoj, ERIK = Eksteraj Rilatoj, Informado kaj Komunikado)

### 2.1 Rezulto de la enketo de la membraro — INFORMO — 10 min — ER

ER: resumo de la rezulto de la enketo. Enketo Agadplano 20-21 : sintezo de rezultoj
Ni konstatas, ke ne devas regule doni informojn, ekz. pri la ebleco havi retadreson @esperanto-france.org aŭ trovi informojn pri retaj kursoj, eventoj, grupoj, ktp. en la reto.

Pri la logotipo kaj plena grafikaro, Marc GIRAUD diras ke li konas grafikiston kaj pretas kunligi la asocion al tiu.

### 2.2 Ĝisdatigo de la komisionoj kaj laborgrupoj — DISKUTO — 15 min — MJ

MJ: mi kontaktis ĉiujn komisionojn por scii kiu estas en ili, kio estas la nuntempa laboro, ktp. Nur kelkaj respondis. Ni devas decidi pri renovigado de la tabelo, kiu resumas la membrojn kaj agadojn de niaj komisionoj, ni devas ĉion ĝisdatigi: ja estas homoj listigitaj, kiuj ne plu estas en komisionoj, aŭ komisionoj kies agadoj finiĝis aŭ estas portempe haltataj. Ĝisdatigita tabelo:
https://docs.google.com/document/d/1H9_729Bufm0ERcKzLSuuPYE6i7OEh81DfN0sJyJSSAA/edit

Pri *LME*: CN bezonas helpantojn por plu produkti la revuon. Vidu punkton **2.4** de la tagordo.
XG: eblas organizi Zoom-kunvenojn por denove ekagadigi komisionojn, samkiel okazis hieraŭ en ERIK.

BF: Estus bone ke ĉiu komitatano partoprenu almenaŭ komisionon.

JLM parolas pri la nova komisiono Commission économique (K-EKO)
“Post 134 jaroj da ekzisto por Esperanto, kio ekzistas rilate al la ekonomia kampo?”
Estontaj informoj sur la Forumo de Espéranto-France / Commission économique.

JLM: pri kiuj havas demandon/peton pri financoj/budĝetoj, mi petas bonvolu fari ĝin rekte ene de la Forumo de Espéranto-France / Commission finance, tiel la respondeculoj povus pripensi/studi/respondi/decidi pri ili plej efike tra la tempo.

## 2.3 ERIK: Raporto de la laborgrupo — INFORMO — 25 min — AA/XG

12 homoj kunvenis hieraŭ en la laborgrupo – membroj de la komitato kaj eksteruloj.
*Detala protokolo: https://cryptpad.fr/pad/#/2/pad/edit/ib1+OEsjBpZDlXZeDlDL4bfO/*

### 1. Peticio sur la retejo de la Nacia Asembleo — DECIDO

https://petitions.assemblee-nationale.fr/initiatives/i-238
Lanĉita de Marc ANSELMI en 2020-11. La ideo estas ke tiu peticio aperu unua en la listo de peticioj rilate al la komisiono pri kulturaj aferoj kaj edukado. Tamen la apero de la – malgranda – kvanto da subtenantoj kaj de celo "100 000 voĉdonoj" ne estas favora al tiu agado. Espéranto-France rimarkis ke ja estas bone ke homoj volas aktivi, sed bedaŭras mankis kontakto kun la landa asocio antaŭ ol lanĉi la agadon.
La peto de Marc ANSELMI, transdonita de AK, estas: ***"Ĉu la Komitato de Espéranto-France akceptas, ke oni skribu per ĉiuj kanaloj de EF al la membroj kaj simpatiantoj pri la petskribo?"***

*–» Ĉu Espéranto-France apogu kaj diru al ĉiuj membroj "voĉdonu!"*
ne: 7
jes: 4
sindetenas: 5

*–» Ĉu Espéranto-France tamen komuniku pri la ekzisto de tiu peticio?*
ne: 0
jes: 13
sindetenas: 4

### 2. TV-serio OVNI(s)

Canal+ elsendis en 2021-01 TV-serion nomatan *OVNI(s)* ene de kiu rolulino uzas vortojn en Esperanto, ĉarme, afable kaj amuze. La serio estas laŭde taksata de la kutimaj gazetaraj reviziantoj, kaj Espéranto-France do eble ekkaptu tiun ŝancon krei paĝon pri la serio komunikante pri Esperanto, aŭ eĉ krei retajn agadojn rilate al ĝi: memeoj, reklamoj, videoj? LT, XG, kaj AA akceptis pripensi tion.

Propono de LT: "**Ĉu la Komitato de Espéranto-France akceptas, ke ni pagu 100 EUR por krei reklamon ĉe Facebook?**"
*–» Ĉu Espéranto-France faru reklamon pri tio? **JES unanime***

### 3. Regulaj video-kunvenoj

Sekve de la fruktodona kaj bele okazinta Zamenhofa Festo per Zoom en 2020, BF ŝatus ke ni organizu 2~3-foje jare video-kunvenojn al la membroj, kaj laŭtemajn konferencojn al la ĝenerala publiko.
BF proponas ke EF pagu Zoom-abonon je 190€ jare, kiu ebligas organizi retajn eventojn por ĝis 300 homojn samtempe
CN: ankaŭ la virtuala kongreso de UEA montriĝis sukcesplena ĉi-somere 2020 do mi plene subtenas.

### 4. Komunikado "Esperanto ekzistas"

Ni pripensu agadojn rilate al nia unua celo: "komuniki al la ĝenerala publiko ke Esperanto estas ja moderna lingvo uzata de homoj tra la mondo".
Okazis kuncerbumado surbaze de kiu povos labori la ERIK-komisiono:
https://docs.google.com/document/d/19td0X3AIbmDfRLglOX9_kDAyoILu70iFHmFv1BSLkW0/edit#

## 2.4 *Le Monde de l'Espéranto* **INFORMO** **10 min** **BF**

Laborgrupo kun temo *Kiel prifortigi la teamon kaj instigi al la kunlaboro kun aliaj publikaĵoj de federacioj kaj lokaj kluboj* bedaŭrinde ne povis okazis hieraŭ.

BF kaj CN hieraŭ babilis. Venis la fina punkto ke ja estas necesa helpo kaj por kunordigi kaj por redakti artikolojn. Kompreneble helpo povas veni ekster la komitato. Espereble kun granda teamo la laboro povos esti disigita. Espéranto-France alvoku ĝenerale por bonvolulaj kontribuoj en la revuo: malgrandaj sed regulaj taŭgas.
AA proponas krei forumon por allogi kaj kunlaborigi homojn, kiuj ŝatas verki artikolojn sed eble ne scias aŭ pensas proponi ilin por niaj gazetoj – aŭ uzi parton de ĝenerala forumo de Espéranto-France. Tio faciligas kunordigadon.

Propono de aliaj publikaĵoj, kiuj povus kunlabori: revuo de Gironde, bulteno de Normandio, orienta regiono (?), de norda federacio, ĉu Esperanto-Info ? → alvoki pere de LME

Ligoj al kelkaj revuoj:
- Bulteno de Esperanto-Gironde: LEGI http://esperanto-gironde.fr/legi/
- https://esperanto-france.org/normandie aux: https://data.bnf.fr/fr/34501825/normanda_esperanto_bulteno/
- Revuo de Espéranto-France-Est: La Informilo http://esperanto.france.est.free.fr/
- Bulteno de Espéranto-Nord : Norda Kuriero
- Espéranto-Info : https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-64-decouverte
- revue de SAT-Amikaro, La SAGo https://www.sat-amikaro.org/La-SAGO-revue

## 2.5 Reta butiko: raporto de la prezentado **INFORMO** **5 min** **ER**

ER: Resumo de la hieraŭa prezento de Axel Rousseau. Ĉe https://butiko-esperanto-france.org/ ekde nun eblas mendi varojn de la libroservo. Ne ĉiuj varoj estas disponeblaj sed la plej vendataj kaj en la stoko ja estas. Nokte okazas ĝisdatigo de la stokoj per skripto ligita al la datumbazo de Arthur. Inter la diversaj eblecoj: vendado per opoj, rabatoj, kalkulo de sendokosto laŭ la prezoj de La Poste, …
*Tiu reta butiko ankoraŭ ne estis publike lanĉita ĉar ni deziras iom testi plu antaŭ ol komuniki pri ĝi, post kelkaj semajnoj. Pli bone ke nur kelkaj homoj provu unue ol aĉeto-lavango pro tro frua varbado.*
BF: ni alvoku al volontuloj por redaktado de varo-priskriboj.
CN: eble malvaloriĝo de varoj indus konsideri por la vendokostoj.

## 2.6 Krei retajn servojn por la federacioj kaj kluboj **DISKUTO** **15 min** **BF**

Espéranto-France deziras proponi servojn al la federacioj, por ke ili havu materialon facile uzeblan por krei retpaĝaron. Por tio ni bezonos laborigi profesiulojn. Ĉu la komitato konsentas pri la ideo pagi profesiulojn por krei tiajn servojn?

Propono: listigi la jam ekzistantajn retejojn
Pascal prezentas https://provenco.esperanto-france.org/
Estus bone listigi la ekzistantajn retejojn kaj kontakti la mastrumantojn de tiuj retejoj.

## 2.7 Volontulo por zorgi pri Afrika Solidareco **DISKUTO** **10 min**

BF: J.-Marie Cash kutime zorgas pri la afero, sed decidis pli labori ĉe *Le Monde Diplomatique* do bedaŭrinde ne plu povas dediĉi sufiĉe da tempo al tiu agado. Ni bezonas trovi iun por zorgi pri tio: petoj kaj mendoj al la sidejo.
JLM: ĉe Arthur estas konto "Réserve Afrika Agado" kun sumo en ĝi. Temas pri ~1000 EUR da en/el-

spezoj.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

### 3.1 Zam' Festo 2020 : raporto — INFORMO — 10 min — BF

BF prezentis resumon de la reta Zam-festo, kiu okazis rete en decembro. Ni organizos aliajn retajn eventojn 3 aŭ 4-foje ĉiujare.

### 3.2 Venontaj retaj eventoj : kiam? Pri kio? — DISKUTO — 15 min — BF

La venonta reta renkontiĝo okazos en marto.

### 3.3 Eldono de *Livret des membres*: raporto de la laborgrupo — INFORMO — 10 min — ER

La sabata laborgrupo ne okazis pro manko de partoprenantoj.
Nuna gvidilo: https://esperanto-france.org/IMG/pdf/livret-des-membres-2017.pdf

### 3.4 Eldonprojektoj

1. **Apogo al eldono de la libro *Ruĝaj vojoj de Aŭrovilo* (GT+Ewa Grochowska) BF**

Dum nia kunveno de la 13a de septembro, ni decidis, ke Ewa kontaktu Petron. Ni ankoraŭ ne ricevis informon de Ewa pri tio.

2. **Raporto de la komisiono pri Eldono — INFORMO — 10 min — ER**

*Stranga Malapero* estas facila legaĵo ĵus eldonita:
https://butiko-esperanto-france.org/lectures-faciles/896-stranga-malapero.html
La sekva eldono estos traduko de *Tous super-héros* de Lilian Thuram.

### 3.5 Kongreso de Espéranto-France 2021 — INFORMO — 10 min — MJ

*Afiŝo: https://fichiers.esperanto-france.org/kongreso-2021/affiche-A4-congres-2021.pdf*
*Aliĝilo: https://fichiers.esperanto-france.org/kongreso-2021/aligxilo-congres-2021.pdf*

MJ: Malgraŭ la KoViM-situacio la prepar-agadoj por la kongreso okazas kvazaŭ ĉio glate iros. La LKK atendas anoncon en *LME*.
BF proponas komuni ke la kongreso normale okazos. Kaze ke ĝi ne povas, ĝi estos prokrastita ĝis 2022 kaj la homoj kiuj jam aliĝis ne bezonos denove aliĝi por la 2022a kongreso. Ni devos aldoni tiun informon en la dokumenton, kiun ni disdonos.
ER: ni rapide varbu sen atendi la venontan LME-on, en nia ĉefa retopaĝo kaj per Esperanto-Aktiv

VB/AA/XG : ni tamen prepariĝu por samtempa paralela virtuala reta kongreso.

## 4. KAPABLİGO (instruado kaj ekzamenoj)

### 4.1 KER-Ekzameno C2 — DISKUTO — 10 min

https://edukado.net/ekzamenoj/ker/enketilo kaj https://www.coe.int/fr/web/portfolio/self-assessment-grid

GT: Katalin Kováts kaj aliaj preparas C2-nivelon de la KER-ekzameno. Necesas instigi trapasi ĝin (vidu detalojn en la protokolo de la komitato-kunveno de la 12a de septembro) ĉar nepre 150 homoj aliĝu antaŭ ol la universitato akceptas la kreadon de tia nivelo. Nuntempe estas "nur" 80 interesatoj. Espéranto-France komuniku pri la afero. GT sendos artikoleton por nia retejo, Esperanto-Aktiv kaj *LME.* Samtempe ni povos varbi ankaŭ pri la ekzameno de FEI.

→ **Espéranto-France komuniku pri ambaŭ eblecoj.**